Printempo 2007 n° 3

RECIM MONDO

*Interna bulteno de Registrolibro de la Mondcivitanoj kaj de la tutmondiĝintaj komunumoj*

*La Monda civitaneco estas neŭtrala je ĉia aparteno. En 1977 la Civitanoj de la Mondo salutis sian amikon Jean Rostand, agnostika kaj liberpensa ; en 2007 ili salutas sammaniere la kredantan abaton Pierre. Du kontraŭuloj, kiujn povis kunigi la monda civitaneco por « **defendi la homan aferon, esprimi la depostulojn de la monda popolo kaj fine ellabori la leĝon de pacema kaj civilizita mondo** » laŭ la alvoko, kiun ili kune lanĉis la 3an de marto 1966.*

*Dank'al la agado de tiaj personecoj, la civitanoj de la mondo, kiuj ni estas, povas komenci konstrui la mondon, kiun ili jam revis. Tiu bulteno estas bona ilustrado pri tio : ĉiutageca aktivismo, kongresoj, esplortagoj, festaj renkontoj kaj kelkaj instituciaj progressignoj foje simbolaj sed ĉiufoje kiel manifestado de la volo de la monda popolo.*

*DD*

La bulteno **RECIM-Mondo** estas adresata :

- Al la Mondcivitanaj Registrocentroj kaj al la Registrolibraj Korespondantoj ;
- Al la Kongreso de la Popoloj ;
- Al kelkaj tutmondiĝintaj urboj kaj komunumoj ;
- Al kelkaj organizaĵoj, kiuj klare elektis tutmondisman vojon.

## Sommaire

Un Citoyen du Monde d'exception .................p. 1
Séminaire de Bohicon (Bénin) .......................p. 2
Table ronde à Melbourne (Australie) ..............p. 2
Service Juridique d'Enregistrement ................p. 3
Journée des Citoyens du Monde .....................p. 3
Nouvelles des Centres ............................ p. 4 et 5
Message de René Wadlow.............................p. 5
Conférence UBUNTU à Genève.....................p. 6
7ème rencontre des Juges à Lucknow .............p. 6
Commission des mondialisations............. p. 7 et 8
Boulock village mondialisé ...........................p. 8
Prix de l'Unesco d'éducation à la Paix............p. 9
CILAME ......................................................p. 9
Elections au Congrès des Peuples .................p. 10
Calendrier .................................................p. 10

Escepta Civitano de la mondo :

# Henri GROUES, kromnomita « Abato Pierre »



Jen de tri monatoj Abato Pierre forlasis nin je la 95-jaraĝo. La gazetoj kaj aliaj amaskomunikiloj kaj en Francio kaj en aliaj landoj de la planedo jam prezentis multon el giganta faro de tiu eksterordinara individuo, tiu « ekribelanto », kiu sciis eliri el sia meditado kiam la situacio ŝajnis al li netolerebla. Sed pri lia publika agado ankoraŭ ne ĉio estas dirita.

Kompreneble ĉiu scias, ke la postlasita institucio estas la Kunuloj de Emauso. Oni malpli scias, ke Henri Grouès engaĝis sin tuj en la komenciĝo de la dua mondmilito je la servo de la persekutitaj izraelanoj, de la rezistantoj de Vercors-montaro kaj de la militrifuzantoj, kiujn li kaŝis kaj kondukigis en Svision. En sia servo al la rezistantoj li kromnomiĝis « Abato Pierre ». Arestita, li sukcesis forskapi tra Hispanio kaj atingis la mar-armeanojn de la « Libera Francio », en Nord-Afriko. Nemulte post la liberiĝo, li engaĝis sin dum nelonga tempo en politikon kaj eĉ elektiĝis en la francan Nacian Asembleon (la foto datiĝas de tiu epoko)..

Kaj tie ĉi citinda anekdoto : fakte la 13an de junio 1949 li proponis amendon por plani « kontribuaĵon de unu milono el la militaraj elspezoj profite al mondaj federaciaj organizaĵoj », propono, kiun oni devas ligi kun lia aparteno al la Universala Movado por Monda Konfederacio, kies vicprezidanto li estis ekde 1947 (Kongreso de Montreŭ, en Svisio).

Necesas diri, ke lia tuta vivo estis dediĉita al la defendo de la homa afero, ne hezitante adopti originalajn poziciojn. Oni retrovas lian nomon inter la membroj de la subtena komitato al Garry Davis, en 1948. Li agadas kontraŭ la enkarcerigo de la konsciencobĵetantoj en 1949 kun Albert Camus, Jean Giono, Alfred Kastler, André Breton kaj aliaj tiam famaj nomoj. Li estos subteninta tiun aferon ĝis 1962, kiam dum interparolado kun Charles de Gaulle, li aŭdas la prezidenton diri al li, ke « estas absurde kaj maldigne trakti la obĵetantojn kiel deliktulojn. »

En 1966 abato Pierre estas unu el la subskribintoj de la 13 monde famaj Mondcivitanoj. Poste, de kongresoj al publikaj kunvenoj, kun Guy kaj Renée Marchand, aŭ kun Jerry Bourgeois, li multe vojaĝis, por ke la aŭskultantaroj, kiujn li estis kapabla kunigi, konsciiĝu pri sia mondcivitaneco, pri ĉies respondeco antaŭ la estonteco de la homaro kaj de la planedo.

*Daniel Durand*

# Seminario de Tutmondismaj Studoj en Bohicon (Benino)

La asocio BCEBI (Benina Centro por Evoluigo de la Bazaj Iniciatoj, franclingve CBDIBA), fondita en septembro 1990, enhavas 35 membrojn kaj 70 konstantajn dungitojn. Ĝia celo estas la helpo al la kamparanaj organizaĵoj, pli aparte al la inaj grupoj, por ilia vera memevoluo : mikrofinanco, mikro-entreprenado, funkcia alfabetigo kaj baza franca lingvo, prokektado de medio, sano, edukado pri juro, malcentralizado kaj defendo de la homaj rajtoj, klerigo, mikro-realigoj, organiza apogo .. . BCEBI, membro de ASKOP, havas eksperimenton kiel organizinto de ĉirkaŭ 160 seminarioj. Ĝi do estis ideala partnero por la aranĝo de la unua Seminario de Tutmondismaj Studoj en Afriko.

**De la 6a ĝis la 8a de oktobro 2006** grupo da 35 homoj venis el Benino, Togolando, Ganao kaj Francio por pripensi kaj interŝanĝi pri monda demokratio. La ĉefaj intervenantoj estis la profesoro Gbegnonvi kaj la doktoro Azilinon el la universitato de Abomey-Calavi, en Benino, kaj el Registrolibro Daniel Durand kaj Liliane Metz-Krencker.

« **En la 16a jarcento Okcidenta Afriko eniris en la tutmondiĝon** ». Tra diversaj situacioj la okcidentafrikaj loĝantaroj iris el tradicia hereda stato por atingi kion profesoro Gbegnonvi nomis « stato de konfuzo kaj de hipokriteco » ĉar finfine la afrikaj loĝantaroj ĉu en Ameriko ĉu en Afriko, ĉu en tempo de koloniiĝo, ĉu en tutmondiĝa erao, restas submetitaj al la profitsistemo.

Fronte al tiu situacio, Mike Azilinon, doktoro pri politikaj sciencoj, faris grandan klarigadon pri la senco de la demokratio, sed ankaŭ pri la kapablo de la afrikaj mensoj kapitaligi la konojn kaj spertojn. En Afriko, oni ne rezignas siajn filozofion kaj kredojn por adopti novajn, sed oni asimilas iuj kaj aliaj ĉirkaŭ la forto de la toleremo, kaj tiamaniere **demokratio** evidentiĝas pli kiel **vivmaniero** ol kiel regmaniero, ke la laika ŝtato ne estas apartigita de la religioj, kiel en Eŭropo, sed malferma al ĉiuj religioj, ke ŝtato ne fiksiĝas sur maldekstra aŭ dekstra aŭ alternativa ideologio, sed restas malferma al ĉiuj fluoj de la moderna penso. En tiu perspektivo la monda demokratio estas nur normala plivastiĝo de la penso, kaj la nova transpasota stadio, pri kiu tiom timegas la potenculoj.

El la debatoj ĉirkaŭ tiuj temoj, sed aŭ ĉirkaŭ tiuj tradiciaj al la Mondcivitanoj : monda civitaneco kaj nesufiĉoj de la internaciaj institucioj, rezultas rezolucioj, projektoj de renkonto, la kreado de afrika reto de la Mondcivitanoj kaj la perspektivo de dua seminario, kiu okazus en Accra.

? Citoyens du Monde, CEBECIM / CBDIBA, BP 256, BOHICON, Bénin

Ø http://www.recim.org/ascop/pr-06-fr.htm

*DD*

**Melburno, 4an de februaro 2007**



# Konferenco de Aŭstraliaj eminentuloj por la kreado de Pac-ministerio sine de la Aŭstralia federacia registaro

Fine de la jaro 2006, la « Centro por Ŝanĝo dum la Tria Jarmilo » deklaris la volon sin dediĉi al la organizado de forumo pri la ĉefaj problemoj, kiuj povus endanĝerigi la estontecon de la homaro. Vd. la anglalingvan ttt-ejon www.centerforchange.org.

Prezidate de la fondinto D-ro Michael Ellis la Centro celas respondecigi la komunumojn kaj la plurnaciajn firmaojn emfazante pri la neceseco organizi la sanzorgojn, la edukadon kaj la socian integriĝon, kio ebligos favorigi la daŭran elvolviĝon de la paco en la mondo. Li do alvokis eminentajn Aŭstralianojn el diversaj organizaĵoj, kiuj provas starigi mondan pacon kaj solvi la konfliktojn per pacaj metodoj.

Do en Melburno la 4an de februaro 2007 okazis tiu konferenco. D-ino Liliane Metz-Krencker estis invitita partopreni en ĝi kiel reprezentantino de Mondcivitana Registrolibro. La P-ro Chris Hamer, korespondanto de Registrolibro kaj prezidanto de la Aŭstralia Mondcivitana Asocio en Sidnejo ĉeestis same kiel niaj korespondantoj en Perth S-ro Lyndon Storey kaj en Melburno D-ro Michael Ellis mem.

Tiu kunveno okazis pro ŝia invito en la oficejo de Senatanino Lyn Allison, federala reprezentantino de la Aŭstralia demokrata partio, kiu konsentis partopreni en nia konferenco kaj, se tio estos decidita, prezenti mocion al la Aŭstralia federala parlamento pri nia postulo.

La grupo estis prezidata de D-ro Ellis kaj telefone ligita al S-ino Stella Cornelius, prezidantino de la « Reto por la solvado de la konfliktoj » (www.crnhq.org), kiu en la 80-aj jaroj jam iniciatis tiun klopodon. Libro « *Aŭstralia kampanjo por Pac-ministerio* » estis publikigita de S-ro Keith Suter en 1984 kaj prezentita al la registaro. Keith Suter estas aŭstraliano, Delegito al la Kongreso de la Popoloj elektita en 1987 el la 8a balotelektado.

Dum tiu kunveno rezolucioj estis faritaj kaj oni decidis :

? prezenti leĝan projekton. Tiu leĝa projekto por la kreado de Pac-Ministerio estis prezentita al la Aŭstralia registaro en marto 2007 de Senatanino Lyn Allison.

? krei novan asocion. Ĝi nun ekzistas kaj nomiĝas « Mondaj civitanoj por Paco »

? krei novan ttt-ejon : www.globalcitizensforpeace.com.

La pluzorgado estos plenumata de D-ro Michael Ellis. Jaraj kunvenoj estas planitaj.

**NOVA !**

# JURA REGISTROSERVO

Dum sia plena kunsido de la 4a de marto 2006, la Kongreso de la Popoloj decidis pri la kreado de " Jura Registroservo ". Tiu servo celas la komunumojn kaj organizaĵojn, kiuj deziras evolui ekster la ŝtataj kadroj, tamen sin bazante sur la demokratia rajteco, kiu venas de mondaj transnaciaj balotelektoj al asembleo kun supernacia destino. **La kreado de tiu jura registroservo estas la bazo de iĝanta monda civila juro**. La nuna komenca periodo estas malfermita al la organizaĵoj de la civila socio : transnaciaj statutoj, reglamentoj, konsisto de la regantaj organoj, konvencioj, kontraktoj por servoj kaj aliaj licaj aktoj de la civila vivo. Ne estas akceptataj la tekstoj kaj aktoj, kiuj necesigas la uzon de aparta ŝtata leĝaro (biena proprieto, marka proprieto, ktp.), kaj la aktoj de la individua privata vivo. Ĉiu registriĝo en la Jura Registroservo implicas la konsenton pri morala aŭtoritato de Kongreso de la Popoloj kaj pri arbitracioj, kiuj montriĝus necesaj, fare de la Kongreso de la Popoloj mem aŭ de alia ento, kiun ĝi estus tiucele kreinta.

La registriĝoj estas fareblaj en Esperanto, franca, angla aŭ hispana

Kvar fakoj en tiu servo :

## 1. Statutoj kaj konstituciaj tekstoj

Ĝis nun tri organizaĵoj metis siajn statutojn : ASKOP (Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj) Monda Solidareco kontraŭ la Malsato kaj Mondcivitana Registrocentro en Bamako (Malio).

## 2. Kontraktoj kaj aliaj plurflankaj aktoj

Ĝis nun 4 konstraktoj subskribitaj de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato kun la produktogrupoj N'Gnope-Dighnane kaj Verda-Fingro (Togolando), Gnoumalon (Burkinio) kaj ECOFAM (Kongio).

## 3. Ĉartoj, kaj unuflankaj deklaracioj kaj sindevontigoj

Ĝis nun : la Tutmondiĝa Ĉarto de la komunumo Kashusha, kaj la Konvencio de Kashusha pri la homaj rajtoj.

## 4. Petskriboj faritaj al la Kongreso de la Popoloj.

Ĝis nun : peto farita de la Mondcivitana grupo en Corrèze (Francio) por la starigo de internacia jura statuso de la politikaj kaj ekonomiaj rifuĝintoj ; kaj la rekomendoj faritaj par la Seminario de Tutmondismaj Studoj en Bohicon en oktobro 2006 por instituciigo de la monda civitaneco kaj por ke la Kongreso de la Popoloj sin devontigu en pledado al monda demokratio.

**EKVINOKSO 2007**

# *Tago de la Civitanoj de la Mondo*



**Magdeburgo, la 18an de marto 2007.** Por la tria sinsekva jaro la Mondcivitana Asocio « AWC » de Saksio-Anhaltio (Germanio) igis la printempan ekvinokson la « tago de la Civitanoj de la Mondo ».

Pasintjare dum kunveno de Kongreso de la Popoloj estis sugestite simbole fari el tiu okazo la lanĉan tagon de la balotelektado al la Kongreso de la Popoloj. Tiu propono estis akceptita de la Magdeburgba asocio, kaj tiamaniere ambaŭ okazoj kunfandiĝis.

La paroladoj de « oficialaj personoj » sin sekvis kun intermezo de danco, muziko kaj kantoj. La tago okazis sub la patroneco de S-ro Steinecke, landa Prezidento de Saksio-Anhaltio, kaj inter la multaj invititoj, ni nomu Dauji Gupta, eksa urbestro de Laknaŭo, Hindio, Francisko Hounsounou (el Benino), direktoro de la fako de Mondcivitana Asocio por Afriko, Lisinka Ulatowska, reprezentantino de Mondcivitana Asocio ĉe UN, Daniel Durand, prezidanto de Mondcivitana Registrolibro, Henri Cainaud, vicprezidanto de Kongreso de la Popoloj.

Posttagmeze la partoprenantoj dividiĝis en kvar laborgrupoj, kaj post plena kunveno kaj interŝanĝoj de donacoj la tago finiĝis sur la placo de Rathaus por aŭskulti kariljonan koncerton. Brave al Inge Grzyb, Gerhard Hirschmann kaj al iliaj Magdeburgaj amikoj por la organizado de tiu tago.



Krom la lanĉo de la balotelekta periodo por la Kongreso de la Popoloj, estis lanĉita ASKOP-a petletero por ke dum la estonta sesio la Kongreso de la Popoloj proklamu la martan ekvinokson (printempan en norda hemisfero, aŭtunan en suda) kiel « **Tagon de la Civitanoj de la Mondo kaj Tagon de Monda Unueco** ».

Oni povas trovi pliajn informojn el : http://www.recim.org/ascop/pr08-eo.htm

# *Tago de Monda Unueco*

# EL LA REGISTROCENTROJ KAJ KORESPONDANTOJ

Ni donas tie ĉi kelkajn novaĵojn el Registrocentroj kaj el Korespondantoj de Registrolibro. Ni nek scius nek povus prezenti kompletan tabelon de la aktivecoj, tiom multaj ili estas kaj foje tiom longajn preparojn ili postulas. Ke oni pardonu al ni la forgesojn kaj la malgrandajn erarojn. Ni deziras kuraĝon al ĉiu ! Ĉiuj retadresoj estas haveblaj laŭ simpla peto al abc@recim.org

## Vagaduguo (Burkinio)

La 29an de oktobro 2006 la Registrocentro de Vagaduguo okazigis sian Ĝeneralan asembleon. Rezultas el ĝi nova estraro konsistanta el :

Célestin BITIBALY, direktoro
Sandra DRABO, kasistino
Jean-Pierre OUYA, Ĝenerala Sekretario
Nour Ahmadé GUENDA, responsanta pri la klerigado
Théophile MBOKOP, taskita per internaciaj rilatoj.

En 2006 la Centro enregistris 10 novajn mondcivitanojn.

? Citoyens du Monde, pa/ CAFES, 01 BP 6368, OUAGADOUGOU 01

## Bohicon, Benino

Sub la direktoreco de Patrice Lovesse, BCEBI sukcese gvidis la unuan Seminarion de Tutmondismaj Studoj okazintan en Afriko. Poste, fine de oktobro, mondcivitana teamo stariĝis por konsistigi la « Beninan Centron de la Mondcivitanoj ». (CEBECIM).

Patrice LOVESSE, prezidanto

Marc Deguenon, sekretario

Janvier Tossou, kasisto

CEBECIM ricevis la aprobon de Registrolibro la 16an de januaro 2007.

Dum la jaro 2006 Patrice Lovesse kaj ties kunlaborantoj enregistris 83 mondcivitanojn.

? Citoyens du Monde, CBDIBA, BP 256, Bohicon

## Mbanza Ngungu (Kongio)

Elvis Tekadiomona enregistris 26 Mondcivitanojn en 2006. Dank'al helpo de malgranda teamo, li esperas transformi tiun korespondantan servon en Registrocentron.

? Elvis MBIYA TEKADIOMONA BP 267 Mbanza-Ngungu, Bas-Congo

## Kinshasa (Kongio)

La Kinŝasa Registricentro enregistris unu novan mondcivitanon en 2006.

? Citoyens du Monde, pa/ Sheta Mikayele, BP 51, Kinshasa - Limete

## Bejaia (Alĝerio)

Densa aktiveco ĉe Rabah Bendali dank'al kiu estis liveritaj 95 provizoraj atestoj de registriĝo kaj poste 73 legitimkartoj. Bedaŭrinde pluraj plendoj atingis Mondcivitanan Registrolibron, laŭ kiuj la aktiveco, kiun nia korespondanto faris laŭdire profite al la monda civitaneco estis devojigita al aliaj celoj aŭ aliaj interesoj. La estraro de Registrolibro decidis finpunkti la servojn de tiu Korespondanto la 25an de majo 2006.

## Accra (Ganao)

Nia korespondanto Karl Kpodo sukcesis partopreni en la Seminario de Tutmondismaj Studoj en Bohicon. Nun lia peno celas la konsistigon de afrika reto de la Mondcivitanaj responsantoj kaj de Registrocentro en Ganao kun la helpo de Margaret Archeampon kaj de Evans-Fritz Abroampa. Karl Kpodo estas kandidato al la estontaj balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj.

? Karl A.Y. KPODO, P.O. Box 6289, ACCRA-NORTH

## Bamako (Malio)

Korespondanto de Registrolibro ekde la 12a de aprilo 2005, Moussa Dena sin dediĉas plene al sia misio, malgraŭ la malfacilaĵoj ligitaj al lia propra nefirmeco kaj la malriĉeco de lia medio. Gajninte iom da mono dank'al portempa laboro, li iris al Gao kaj al Mopti por prediki la bonan novaĵon de la monda civitaneco. Lastatempe li sukcesis fondi Registrocentron, oficialigitan la 25an de marto 2007.

Moussa Dena prezidanto
Urbain Diarra, Sekretario
Natenin Bagayogo, kasistino.

Tio estas unua afero koncerne la mondan juron : la statuto de la Registrocentro ne estis metita ĉe la Maliaj aŭtoritatoj (tio okazos pli poste) sed ĉe la Jura Registroservo de Kongreso de la Popoloj.

Paralele al la Registrocentro, la teamo volas aranĝi diversajn aktivecojn profite al la virinoj kaj al la junuloj : alfabetigo kaj tinktura metio.

En 2006 : 7 enregistroj, sed 4 legitimkartoj ne povis esti liveritaj manke de poŝta kesto.

? secret_infomali@yahoo.fr

## Dakaro (Senegalio)

La Mondcivitana Registrocentro de Dakaro lastatempe montriĝis tre efika en operacio kiu kondukis al tutmondigo de la vilaĝo Boulock en Gambio. Vd en paĝo de tutmondiĝoj.

? CITOYENS DU MONDE, s/c Landing NIASSY, BP 20336, DAKAR-THIAROYE

## Lomeo (Togolando)

François Teté daŭrigas sian agadon kiel Registrolibra korespondanto. 2 enregistroj en 2006. François opinias baldaŭa la kreadon de Registrocentro en Lomeo, kun helpo de Vessou Kodjo kaj de Togbevi Yawo. El tiuj tri mondcivitanoj du partoprenis en la Seminario de Tutmondismaj Studoj en Bohicon.

? François TETE, BP 13260, LOME

## Mississauga (Kanado)

La Kanada Mondcivitana Registrocentro daŭrigas sian agadon. La Centro okazigis sian ĝeneralan Asembleon la 24an de junio 2006, kun parta renovigo de la responsanta teamo. Brave pro la konstanteco de la peno, sed la teamo deziras, ke pli junaj homoj prenu respondecojn.

En 2006 la Registrocentro enregistris 5 novajn civitanojn de la mondo, kaj eldonis la bultenon numero 16. La komenco de la jaro 2007 vidis la eldonadon de la numero 17.

? World Citizens in Canada, 688 Green Meadow Crescent, MISSISSAUGA, ONTARIO L5A 2V2

## Petion-ville (Haitio)

La profesoro Michelet Michel kunlaboras kun Registrolibro de majo 2005. En 2006 li sukcesis aperigi tri artikolojn en la gazetaro kaj estigi 7 enregistrojn.

? Michelet Michel, B.P. 15096, HT 6140 PETION-VILLE

## Kobe (Japanio)

La Japana Mondcivitana Registrocentro eldonis du bultenojn la 49an numeron en majo 2006 kaj la 50an numeron en februaro 2007.

En 2006, la Registrocentro enregistris 4 novajn Mondcivitanojn.

? Masaji IE, 1.2.17 Suzurendai, Kitimachi Kita Ku, JP 651 11 KOBE

## Romanda Svisio

La Mondcivitana Registrocentro en Romanda Svisio enregistris du

novajn mondcivitanojn en 2006. La responsantoj deziras helpon.

? Citoyens du Monde, Case Postale, CH 1038 BERCHER

### Magdeburgo (Germanio)

De pli ol tri jaroj Inge Grzyb ricevas helpon de la tre vigla Gerhard Hirschmann. Pli ol 50 mondcivitanoj estis enskribitaj en la mondan balotelektan liston.

En 2006 kaj 2007, Gerhard Hirschmann kaj ties teamo organizis mondcivitanan feston dum la printempa ekvinoksa tago.

? Inge GRZYB, Fröbelstrasse 6, 39110 MAGDEBURG

### Illescas (Hispanio)

Fernando Elena Diaz oficiale fariĝis « Registrolibra korespondanto » en marto 2006. Dum la jaro, li sukcesis enskribi 29 novajn mondcivitanojn. Ekde la fino de la jaro 2006 stariĝis registrocentro nomita « Red de Ciudadanos del Mundo » kun la partopreno de Angel Lopez de Torre Diazet kaj de Aña Saldana Fernandez. Interreta ttt-ejo estis kreita : http://www.recim.es.

? Ciudadanos del Mundo, c/.Herradura, 58 Bajo, 45200 ILLESCAS

### Parizo (Francio)

La franca registrocentro de la Mondcivitanoj pluigis sian agandon de majo 2006 ĝis aprilo 2007 kun la helpo de Etienne Nanibet, dungita laŭ kontrakto helpita de la franca ŝtato.

La jaro 2006 estis ĉefe markita de la koncerto, kiun la Registrocentro organizis por soleni la kvardekjariĝon de la alvoko de la 13. La renkonto okazis la 29an de majo dum preskaŭ 3 horoj. Mallonga sed belega enkonduko estis farita de Roger Winterhalter pri la senco de tiu alvoko por nia hodiaŭa mondo, kiu serĉas por si novan vojon. Ankaŭ parolis asociano de « Diagonalo de Ĉernobilo ».

Poste antaŭ teatra plena ĉambro, 4 famaj kaj engaĝitaj artistoj alportis sian partoprenon en la solenado por la antaŭenpuŝo de la mondcivitanaj ideoj : Serge UTGE ROYO, Nathalie SOLENCE, Yvan DAUTIN, Annick ROUX.

En 2006 la franca Registrocentro disdonis 194 legitimkartojn al novaj mondcivitanoj.

? Citoyens du Monde, 15 rue Victor Duruy, 75015 PARIS.

### Timisoara (Rumanio)

Dorin Hehn instalis informcentron meze de la urbo Timisoara. En 2006 plurfoje li prelegis pri mondcivitaneco, Kongreso de la Popoloj kaj ASKOP, interalie la 27an de marto dum la tago de amikeco Rumanio-Moldavio, la 24an de junio ĉe la radioelsendejo Timisoara kun la prezidanto de la Eŭropa movado. Li publikigis anoncojn en la lokan gazetaron de 4 grandaj urboj. Li planas kunlabori en 2007 kune kun la Terprotekta Asocio kaj de ties projekto « mondaj homoj kaj lokoj ». Dorin Hehn anoncas sian ĉeeston dum la kunveno de la Kongreso de la Popoloj la 3an kaj 4an de novembro 2007.

? Dorin HEHN, Str A. Saguna, A4, Ap.4, RO 1900, TIMISOARA

### Sidneo (Aŭstralio)

La agado de Christopher Hamer en 2006 ĉefe konsistis en la plifortigo de la Mondcivitana Asocio. La kunveno en Melburno estis grava momento de tiuj lastaj semajnoj.

Christopher HAMER, 3/141 Oberon St, COOGEE, NSW 2034

### Esperantista Internacia Registrocentro

La agado de la Esperantista Internacia Registrocentro ĉefe okazis per la partopreno en la Universala Esperanto-Kongreso en Florenco (Italio) (2210 homoj el 62 landoj) kie, kun Daniel Durand Geneviève Charpentier deĵoris ĉe stando dum la movada foiro kaj prelegis antaŭ sesdeko da homoj. La espero trovi novajn Registrolibrajn Korespondantojn en la « reprezentitaj » landoj ne efektiviĝis.

? Geneviève CHARPENTIER, 32 C rue Jean Perrin, FR 77190 DAMMARIE LES LYS.

## Mesaĝo de René Wadlow

Karaj geamikoj,

Kiel reprezentanto de la Mondcivitana Asocio ĉe unuiĝinta Naciaro en Ĝenevo, mi volas transdoni al vi miajn plej bonajn dezirojn por la kunveno kaj mallonge prezenti al vi mian analizon de la prioritatoj.

La unua donitaĵo kontraŭ kiu ni staras estas tio, kion mi nomas « Arko de nestabileco », la tensioj kaj konfliktoj, kiuj etendiĝas ekde la regiono Afganio-Pakistanio-Irano-Irako-Israelo-Palestino-Libano-Sirio-Egipto-Sudano. El ĉiu ekstremaĵo de tiu arko la nestabileco etendiĝas de Afganio al la respublikoj de meza Azio de la eksa sovetia bloko kaj ankaŭ el Sudano al Ĉadio kaj la Centrafrika respubliko.

La dua donitaĵo, malpli perforta sed potenciale danĝera estas la pligraviĝo de blinda naciismo en Rusio, en meza Eŭropo kaj en la eks-Jugoslavaj ŝtatoj. Ekzistas multaj signoj de potenciala konflikto – la problemo de la statuso de Kosovo estos traktata ĉe UN dum la venontaj tagoj.

Ni bezonas pripensi la rolon, kiun la Civitanoj de la Mondo povas ludi en la respondo al tiuj problemoj. Ni havas malmulte da organizaj kapabloj. Tra miaj penoj por instigi la civitanojn de la mondo por subteni la iniciaton de UN, mi konsideras tri grupojn de ŝtatoj :

1/ Malmulte da landoj en kiuj ekzistas strukturita mondcivitana movado : Kanado kaj Usono en Norda Ameriko, Francio, Svisio kaj Germanio en Eŭropo, Hindio kaj Tajwano en Azio, same kiel certa nombro de kontaktoj en Afriko, sed pri kies struktura firmeco estas malfacile taksebla de malproksime.

2/ dua grupo da landoj en kiuj ekzistis aktiva movado de mondfederaciistoj / mondcivitanoj, sed el kiuj mi ricevas malmulte da respondoj : la nordaj landoj, Nerderlando, Britio, Italio (malgraŭ la forto de la movado por federacia Eŭropo kaj ĝia asocio kun la monda federaciista movado), Japanio (kie 200 000 homoj ligiĝis kun la planedaj civitanoj meze de la 1970-aj jaroj, sed kie ŝajne neniu strukturo plu ekzistas).

3/ la tria grupo konsistas el landoj, kie neniam ekzistis mondfederaciista aŭ mondcivitana movado : Latina Ameriko, la araba-islama landaro, Ĉinio kaj Sud-orienta Azio, Rusio kaj meza Eŭropo.

Ni bezonas esplori kiamaniere ni povos plej bone utiligi niajn kapablojn por havi efikojn sur la mondan politikan situacion tra UN. Ni devas ankaŭ vidi kiel utiligi la aktivecojn de UN por plivastigi la bazon de niaj aliĝintoj.

Mi interesiĝos legi la protokolon de via kunveno.

Kun miaj bondeziroj

*René Wadlow*
*Reprezentanto de Mondcivitana Asocio ĉe UN*
*Eksa vic-prezidanto de Mondcivitana Registrolibro*
*Elektita Delegito al la Kongreso de la Popoloj.*

# Gazetara recenzo

*Ni estus ŝatintaj publikigi en tiu bulteno RECIM-mondo, kion ni jam faris en la n-ro 1, gazetaran recenzon de la bultenoj eldonitaj de la diversaj registrocentroj. Alvoko estas lanĉita al helpemuloj por la estonta numero !*

# Internacia konferenco por la reformado de la Internaciaj Institucioj okazis en Ĝenevo

En la sidejo de ILO (Internacia Labor-organizaĵo) la 20an kaj 21an de novembro 2006

Tiu konferenco celis starigi dialogon inter la diversaj niveloj de reganteco kaj la aktoroj de la civila socio, kaj estis parto de monda kampanjo por profunda reformo de la internaciaj institucioj, kiu devas okazi inter 2006 kaj 2009.

Estas kvar ĉefaj celoj de tiu kampanjo :

1. Sukcesi starigi procezon de profunda reformo de la sistemo de la internaciaj institucioj.
2. Sukcesi impliki en tiun procezon plej grandan nombron da agantoj aktivaj sur la monda scenejo : internaciaj institucioj, diversaj registaraj niveloj kaj civila socio laŭ vasta koncepto.
3. Plu redakti proponojn devenantajn de la civila socio pri la konceptaj, proponaj kaj metodologiaj bazoj.
4. Kontribui en la konstruado de internacia sociala kaj politika movado kapabla aplikigi la reformajn procezojn.

Manifesto estas aprobita de diversaj elstaruloj kaj de la organizaĵoj kiuj subtenas la kampanjon same kiel agadan linion, kiu konsistas el :

? konsciigo de la monda publika opinio ;
? konduko de agadoj subtenataj de la monda publika opinio ;
? organizado de ĉiaj manifestacioj, kunvenoj, konsultiĝoj, debatoj kaj aktivecoj por prezenti, diskonigi kaj disvastigi la kampanjon ;
? kolekto de ĉiuj konkludoj, kaj ties prezentado antaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝinta Naciaro por ke monda konferenco pri la profunda reformado de Unuiĝinta Naciaro estu kunvokita.

Por subteni tiun kampanjon, legi kaj subskribi la manifeston kaj sendi ĝin al aliaj tutmondistaj organizaĵoj :

www.reformcampaign.net
Info@reformcampaign.net

*Liliane Metz-Krencker*
*Je la nomo de Mondcivitana Registrolibro*
*kaj de ASKOP*

## 7a Konferenco de la mondaj Justicestroj kaj Monda simpozio de la Ne Ŝtataj Organizaĵoj de la civila socio

organizitaj de la 7a ĝis la 12a de decembro 2006 de la Fako por Pac-Edukado kaj por Monda Unueco (WUPED) en Montessori-lernejo CMS-Laknaŭo (Hindio)



La jara monda ĉefkonferenco de la justicestroj certe grave influis la historion de la Montessori Civita Lernejo pro la ĉeesto de la justicestroj el 19 landoj kaj de iliaj rektaj reprezentantoj por 18 aliaj landoj. On nombris ankaŭ plurajn justic-ministrojn.

La ĉeestantaj juĝistoj konsentis **redakti rezolucion** dum ronda tablo ĉirkaŭ kiu ili sidis kun reprezentantoj de la civila socio, membroj de la organizaĵo WMGD (World Movement for Global Democracy : Monda Movado por Monda Demokratio). *Tiu rezolucio troviĝas en pluraj lingvoj sur la ttt-ejo : www.recim.org/dem/wmgd2006.htm.*

Krome oni petis ĉiujn ĉeestantajn reprezentantojn konsenti diskonigi tiun deklaracion ĉe ĉiuj justicaj instancoj en sia propra lando je loka, regiona aŭ landa nivelo.

Oni ankaŭ rememorigis al la ĉeestantaj juĝistoj neniam forgesi la plej favorajn interesojn de la infanoj, kiam ili devas fari juĝon en justica kortumo.

Estis ankaŭ decidite, sendi tiun rezolucion inter alie al la Juĝista Asocio de Commonwealth, al la internacia Juĝista Asocio, al la Internacia Juĝistina Asocio kaj al la Afrika Juĝista Asocio.

Ne forgesu, ke tiu rezolucio estis verkita de la plej gravaj reprezentantoj el 7 landoj de la monda justica sistemo ĉeestantaj en Laknaŭo sub la alta aŭtoritato de la Juĝisto C.G. Weeramantry, eksa vicprezidanto de la Internacia Kortumo en Hago.

Por ricevi kompletan protokolon de la konferenco de la Prezidantoj de alta kortumo oni povas peti ĝin el CMS (nur en angla) : shishir@cmseducation.org.

Kiel ĉiufoje samtempe okazis

**la Monda Simpozio de la NŜO-j de la Civila Socio invititaj de CMS.**

La ĝenerala temo de tiu kunveno por 2006 estis « ***Al nova monda civilizo*** ».

Ses ĉefaj temoj estis elvolvitaj danke al prezentoj, prelegoj kaj laborgrupoj organizitaj de elstaraj parolantoj reprezentantaj relative multnombrajn tutmondistajn organizaĵojn : Temo 1 : Strukturo de la monda demokratio ; temo 2 : Edukado – baza movado kaj rolo de la civila socio en la konsistigo de nova monda ordo ; temo 3 : nuklea malarmado ; temo 4 : dialogoj inter diversaj kredoj kaj religioj kaj solvado de la konfliktoj ; temo 5 : Homaj kaj infanaj rajtoj ; temo 6 : rolo de la amaskomunikiloj en la organizado de la nova monda civilizo.

La lastan tagon, lunde la 11an de decembro okazis eksterordinara sesio en kiu partoprenis la reprezentantoj de ambaŭ grupoj : la juĝistoj kaj la reprezentantoj de la civilsocietaj NŜO kaj ankaŭ multaj lernantoj de CMS.

Tri homoj estis invititaj ekbruligi la flamon de la ceremonio en la granda akceptejo en la ĉeesto de Doktorino Barthi Gandhi, fondinta prezidantino de CMS, S-ro juĝisto C. G.Weeramantry eksa vicprezidanto de la Justica kortumo en Hago, S-ro Robert Wheeler, prezidanto de la plenuma komitato de WMGD kaj D-ino Liliane Metz Krencker, ĝenerala Sekretariino de la Mondcivitana Registrolibro.

*(Suite page 7)*

**Kongio**

# KASHUSHA (Sud-Kivuto) sin deklaris tutmondiĝinta

La 25an de julio 2006, 12 estroj de vilaĝoj kaj de lokoj de la komunumo Kashusha (40.000 enloĝantoj) kunvenis por aŭskulti la klarigojn de nia amiko Aimé Ruzuba pri la signifo de la tutmondiĝo de komunumoj. Unuvoĉe ili adoptis la tutmondiĝan ĉarton kaj konvencion pri la homaj rajtoj. En regiono profunde markita pro dek jaroj de nesekureco, tiu okazaĵo surhavas altan sencon, demonstrante, ke eĉ en la plej neatingeblaj regionoj la tutmonda demokratio estas komprenita kiel plej bona respondo al la tutmondiĝo de la malordo kaj de la kunfuzo de la apartaj interesoj.



La 11an de aprilo 2007 estis planita la ceremonio de oficiala lanĉo de la aktivecoj de la urbo Kashusha kaj simbola masonado de la unua ŝtono de la urbo, projekto decidita de la enloĝantaro. Pri la progreso de la projekto, ni daŭrigas la aranĝon de la planita areo por enteni la mondheredan urbon Kashusha, sed ankaŭ ni estas konstruantaj malgrandan elektrobaraĵon en la sama loko kaj ni esperas, ke post kelkaj monatoj ni inaŭguros tiun elektrobaraĵon kiam ĝi ekfunkcios ; kvankam niaj rimedoj estas modestaj, tamen la aferoj progresas. Krome antaŭ kelkaj semajnoj ni komencis la plantadon de ornamaj arboj laŭlonge de la vojoj laŭ la loka urboplanismo de tiu teritorio. Ni plu estas konvinkitaj, ke pro via subteno al la evoluigo de la tutmondistaj aktivecoj, vi nepre helpos nin por ke tiu projekto profitu aparte al la tuta loĝantaro de Kashusha kaj ĝenerale al ĉiuj tutmondistoj, kaj ke tio estu sukceso de la Civitanoj de la Mondo. Ĉiuj kune, ni estas alvokitaj por alporti nian kontribuaĵon por la konstruado de pli bona mondo.

*Bisimwa Aimé Ruzuba, Mondcivitano*

? Tutmondiĝa Komitato de Kashusha, SMAE, BP 470, CYANGUGU, Ruando.
http://www.recim.org/dem/kashusha.htm

### Mesaĝo de la Prezidanto de la Mondcivitana Registrolibro al la Kashusha loĝantaro

La 25an de julio 2006, la komunumestroj, vilaĝestroj kaj lokestroj de Kashusha proklamis, ke la komunumo KASHUSHA estas mondcivitana komunumo, monda teritorio ligita al la monda komunumo. Pro tiu tago de inaŭgurado de la laboroj iniciatitaj en la kadro de tiu demokratia tutmondiĝo, la Prezidanto de Mondcivitana Registrolibro kuniĝas per la penso kun la tuta loĝantaro de Kashusha, same kiel kun ĉiuj, kiuj havas tie familiajn, tradiciajn aŭ profesiajn radikojn. Ni deziras, ke tiu eksterordinara tago, kiu estas la 11a de aprilo 2007 estu por ĉiuj la okazo pace antaŭenpaŝi al ekonomia kaj sociala evoluigo de Kashusha kaj al la persona plenhomiĝo de ĉiu el la tie-naskiĝintaj. La vojo al la paco kaj al ĉies bonfarto tiel en Sud-Kivuto kiel en cetera mondo estos ankoraŭ longa kaj peniga. En tiu serĉo de paco kaj de feliĉo, ĉiu ŝtono metita en la konstruado de la monda demokratio, kiu estas necesa fundamento de la paco, estas grava kaj devas esti salutata kiel ekzemplo por la tuta mondo. Kasusha ekvivu en monda paco tiel fortege dizirata de ĉiuj civitanoj de nia planedo.

Miajn plej bondezirojn al ĉiuj !

*Daniel Durand*

*(Suite de la page 6)*

**Poste, en tiu etoso kaj antaŭ aro de pli ol 400 partoprenantoj kaj lernantoj de la Civita Montessori Lernejo la tutmondiĝa ĉarto de la lernejo estis legita kaj donita al S-rino Barthi Gandhi de la reprezentantino de la Mondcivitana Registrolibro kaj la tutmondiĝo de la lernejo fariĝis definitiva.**

Poste, S-ro R.C. Gupta, Ĝenerala sekretario de CMS, eksa jura sekretario por la Registaro de Uttar-Pradesh, post enkonduko, legis la « **Laknaŭan Deklaracion de la 11a de decembro 2006 » :**

*« Por protekti la estontecon de la 2 miliardoj da infanoj en la mondo, la partoprenantoj de la 7a Internacia Ĉefkonferenco de la justicestroj en la mondo, pro la artikolo 51 de la Hinda konstitucio kaj konsente kun la reprezentantoj de la Monda simpozio « Al nova monda civilizo » organizitaj la 8an, 9an, 10an kaj 11an de decembro en Laknaŭo (Hindio) alportas sian subtenon al la 31.000 lernantoj en CMS, kiu proponis, je la nomo de la 2 miliardoj da mondaj infanoj kaj de la naskotaj infanoj de la venontaj generacioj, plifortigon de la agado de Unuiĝinta Naciaro por fari ĝin pli efika ilo, kiu povos malpliigi la frumortecon, malhelpi la detruon kaj la difektiĝon de la medio kaj konstrui pacan kaj prosperan mondon.*



*La Delegitoj el la 31000 lernejanoj de Montessori dum la tutmondiga ceremonio*

*Internaciaj leĝoj adoptitaj de monda asembleo leĝe konsistigita, kapabla protekti homaron kontraŭ la nukleaj minacoj, la ekologiaj ruiniĝoj kaj la internacia terorismo kaj ĉefe protekti la infanajn rajtojn por ke ili heredu estontecon sen katastrofoj en sana medio estu adoptitaj kaj aplikotaj.*

Ĉiuj ĉeestantaj homoj en la ĉambrego pozitive kaj unuvoĉe aprobis tiun deklaracion.

Por fini, S-ro Jagdish Gandhi, fondinto prezidanto de CMS prezentis siajn dezirojn kaj sian plenan dankecon al la ĉeestantaro kaj D-ro Sunita Gandhi resumis tiun memorindan tagon.

*Liliane Metz Krencker*

# BOULOCK, MONDCIVITANA URBETO

## Monda rekordo de gastigemo de eksterlanduloj superita en Gambio.

En la kadro de miaj aktivecoj kiel Mondcivitano kaj animanto de projektoj pri transnaciaj solidarecoj, la vojo lastatempe kondukis min en vilaĝon nomitan Boulock, kiu entenas 760 loĝantojn kaj kiu limas kun la regiono Kazamanco (Senegalio).

Ni estis grupeto : Brigitte mia edzino kaj komplicino, Ousmane, senegala staĝanto el la Universitato de Alta Elzaco, Landing, mondcivitano en Dakaro, Amadou prezidanto de la mondcivitanaj studentoj en Dakaro kaj Irena, amikino el Savojo.

Ni elbusiĝis en tiun malgrandan vilaĝon post ĉirkaŭ 13 horoj sur ĥaosaj vojoj en buseto, sub varmo foje ĝis 45-grada. La homoj vivas plej malriĉe en kabanoj aŭ pli malpli bonstataj domoj, kaj ili brakume akceptis nin ; ili ŝajne jam konis nin, ili nomis nin per nia persona nomo.

Fakte niaj Dakaraj Mondcivitanaj amikoj lige kun la enloĝantoj de tiu vilaĝo, estis preparintaj nian venon kaj tial dum du tagoj en granda korto ĉe ombro de grandaj arboj ni babilis, interŝanĝis ideojn, diskutadis. Ĉeestis la vilaĝestro, la Imamo, la deputitino, inoj, viroj, infanoj : konstante inter 100 kaj 150 homoj.

La diskutoj temis pri mondcivitaneco, paco, malarmado, rilatoj inter nordo kaj sudo, la loka evoluigo, la akcepto de aliulo, de eksterlandano. Spontanee kaj oficiale ili deklaris sin “Mondcivitana vilaĝo”. Laŭ ili tiu tutmondiĝo estis simbola, grava ago devontigonta ilin labori por la paco, la interpopola frateco. La subskribo de la ago oficialiganta tiun decidon estis io bela, kortuŝa.

Kune ni komprenis kion signifas transnacia solidareco, en kiu oni lernas doni sed ankaŭ ricevi (dono kaj “kontraŭdono”), solidareco kiu ebligas al ĉiu sen rasa distingo, ĉu riĉa ĉu malriĉa, ricevi konsideron pro kio li aŭ ŝi estas kaj ne pro tio, kion li aŭ ŝi posedas, ĉar fakte, ni diris, la aferoj de la “mondo en kiu ni vivas estas la aferoj de la tuta homaro, t.e. de ĉiu el ni.”

En tiu spiritostato la virinoj prezentis al ni siajn aktivecojn, sian GIE (Grupo kun Ekonomia), kiu koncernas ĉefe la produktadon kaj la rikoltadon de agroproduktoj. Kun ili ni pripensis pri helpoj, kompreneble, sed ĉefe pri alia formo de evoluigo fondita sur la interŝanĝo de havaĵoj kaj servoj kaj ne sur la spekulado. La ĉeestanta deputito rememorigis al ni, ke la malriĉeco plu kreskas en Afriko, kontinento kiun la blankuloj dispartigis. La ĵurnalisto de la Gambia televido petis nin konkrete subteni la virinajn projektojn.

Kaj por ĉion superi ni rapide konstatis, ke ĉeestis ne nur loĝantoj el Boulock, sed ankaŭ homoj el Kourame, Kazamanca vilaĝo, el kiu la loĝantoj fuĝis pro daŭraj turmentadoj far bandestroj kaj militestroj. Ili estis multnombraj : entute 800 kaj gastigataj de vilaĝo, kiu havas nur 760 enloĝantojn !!!

Ni petis ilin prezenti al ni siajn restadkartojn. Ili ĉeestis, kun afabla rideto (tiu konstanta dono, kiun faras la afrikanoj) kaj ili kunhavis tion jenan : iuj kiom aliaj estis tiom malriĉaj. Ankaŭ la vilaĝestro de Kourame ĉeestis kun ili kaj li asociiĝis kun la vilaĝestro de Boulock por tutmondigi sian vilaĝon. Tio estis neimagebla afero, profunde homa, frata, preskaŭ nekredebla sed vera. Kaj imagu, ke neniu, vere neniu parolis pri ŝtataneca prefero nek pri elektita enmigrado, pri merito, pri ŝtata himno nek pri Gambia aŭ Senegalia flago. Ni estis tie, kune, en tiu grandega korto kaj ni kulturis solidarecon anstataŭ ol unuopecon. Mi profitis el tio por deklari, kiel Prezidanto de la Kongreso de la Popoloj, ke ili superis la mondan rekordon de la akcepto de aliulo, de eksterlandano.

Ho ! kiel strange, vi eble respondus anxdinte tion, tio ne estas normala ; eble ili estas narke stimulitaj. Kaj ja ! post enketo nia delegacio konstatis, ke ili fakte ricevis absolute miraklan pilolon nomita “Fratiĝemologio”, kaj pro tio estis ankaŭ imunitaj kontraŭ tiu plago kiu minacas la okcidenton : la **bruna pesto**.

Saluton al vi !

Salü binander (en elzaca lingvo)

*Roger Winterhalter*
*5an de aprilo 2007*

**Benino**

En oktobro 2006, la urbestroj de la komunumoj Abgangnizoun (en departemento Zou) kaj Kpomasse (en departemento Atlantiko) anoncis, ke iliaj komunumoj sin deklaros “tutmondiĝintaj”. Ni atendas la konfirmon de tiuj anoncoj.



**Ideo de monumento “Civitanoj de la Mondo”**

Maketo konceptita kaj realigita de Henri Cainaud, donacita al la Mondcivitana grupo en Magdeburgo (Germanio)

# UNESKO – premio 2006 pri Pacedukado

La premio 2006 pri Pacedukado estis atribuita al Juĝisto Christopher G.Weeramantry, eksa vicprezidanto de la Internacia Justic-Kortumo, la 21an de septembro 2006.

Tiu kandidatiĝo estis apogita de CMS, la Montessori Civita Lernejo en Laknaŭo (Hindio) kiu mem ricevis la premion en 2002.

La juĝisto Weeramantry devenas de Srilanko kie li sekvis siajn mezgradajn studojn en liceo de Kolombo. Poste li daŭrigis siajn studojn pri juro en la Universitato de Londono, de Kolombo, en la universitato Monash en Aŭstralio kaj en la Nacia lernejo de Juro en Hindio.

Li estis juĝisto en la Supera Kortumo de Srilanko, poste juĝisto kaj vicprezidanto de la Internacia Justic-Kortumo en Hago.

La pravigo de lia nomumo baziĝas sur lia penso kaj sur la packulturo, kies antaŭenpuŝon li ĉiam faris publikigante plurajn librojn kaj artikolojn kaj organizante prelegojn pri :

1. solvado de la interreligiaj konfliktoj
2. diskonigo de la internaciaj leĝoj ;
3. kreskanta konsento pri la koncepto de internacia leĝo
4. malpliigo de la nukleaj armiloj
5. pli ĝusta kompreno de la triamondaj problemoj
6. malpliigo de ĉiaj diskriminacioj
7. malpliigo de la sciencaj kaj teknolokiaj povoj antaŭ la homaj rajtoj
8. pacedukado en la lernejoj
9. organizado de prelegoj pri pacedukado.



Christopher Weeramantry konversacias kun Liliane Metz-Krencker

La Juĝisto Weeramantry iniciatis serion da aktivecoj por la antaŭenpuŝo de la paco en la internaciaj medioj per la civila socio kaj en la lernejoj.

La transkultura edukado instigas al :

- Ø interrasa harmonio en Srilanko
- Ø internacia alproksimiĝo fare de ĉiuj landoj en la mondo
- Ø la universaligo de la internaciaj leĝoj.

Ekde la komenco de la jarcento li ĉefe dediĉis sian forton favore al medio.

Per siaj verkoj li eklaboris por la antaŭenpuŝo de la koncepto pri daŭra evoluigo kaj pri daŭra justico ; en 2005 li publikigis dokumenton por la Programo de Unuiĝinta Naciaro pri Medio, kiun li nomis "poŝlibro pri la mediaj leĝoj".

La juĝisto Weeramantry rekomendas la enkondukon de pacedukado ĉefe en la lernejojn kaj ĉiam postulas, ke oni transformu la spadojn en plugilojn. Li estas pac-homo.

*Liliane Metz-Krencker*

*Komunikaĵo*

## Internacia Konsilio por Tutmonda Aŭtoritato pri Medio – IKTAM/CILAME

Pro invito de la franca prezidento IKTAM partoprenis en la internacia konferenco "Civitanoj de la Tero" okazinta en Parizo la 2an kaj 3an de februaro en la perspektivo de la kreado de Organizaĵo de Unuiĝinta Naciaro pri Medio. La komenca teksto celis "plifortigi la *mondan* regecon pri medio.

IKTAM emfazis, ke la fina teksto de tiu konferenco apogis "**la penojn de la nacioj, kiuj sin mobilizas laŭ spirito de partoprena suvereneco, por plifortigi la *internacian* regecon pri medio**." IKTAM sin deklaras kontraŭ la nesufiĉo de tiu promeso kaj rediras, ke la protektado de medio necesigas pli ol bonvola partopreno inter nacioj, sed **realan tutmondan aŭtoritaton**.

? CILAME, 142 avenue de Versailles, 75016 PARIS

***Anoncetoj***

### AVOLAR (membro de ASKOP)

La Asocio de la Volontuloj por la Kamparana mem-Evoluigo informas la tutmondistojn, ke por sia projekto de helpo kaj de enkadrigo de vundeblaj infanoj en Mbanza-Ngungu (Kongio) ĝi bezonas okazajn helpojn favore al tiuj infanoj.

? Elvis MBIYA TEKADIOMONA - aavolar@yahoo.fr

### Civitanoj de la Mondo en Bamako

La Registrocentro de Bamako (Malio) deziras fondi alfabetigejon kaj metian aktivecon profite al virina grupo. Ĉirkaŭ 1000 eŭroj necesus por tiu iniciato. Pli da informoj ĉe la sekretariejo de la centro :

? secret_infomali@yahoo.fr

La flegejo de la tutmondista komunumo de **Kalonge (Sud-Kivuto, Kongio)** ŝatus ekrilati kun flegistajn servojn en Eŭropo.

? alainlukwebo@yahoo.fr

# BALOTELEKTOJ AL LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

La jaro 2007 estas tiu de parta renovigo de la Kongreso de la Popoloj.

Tiuj balotelektoj estas anoncitaj depost la Plena Kunveno de Kongreso de la Popoloj. Laŭ la reglamento de Kongreso de la Popoloj, la Balotelekta Kontrolkomisiono estis regule konsistigita kaj dufoje kunvenis. Ĝis nun, ĉio okazis kiel planite, krom la limdato por la alsendo de la kandidatiĝaj dosieroj, kiu devis esti prokrastita.

La Kongreso de la Popoloj estas de nun trione renovigebla ĉiun trian jaron, po 15 delegitoj. Ĉiu delegito estas elektita por naŭjara mandato.

La voĉdonantoj estas dividitaj en tri voĉdonantaroj, kiel tio estis klarigita en RECIM-info n-ro 4, (paĝo 1).

## 20 kandidatoj

La listo de la kandidatoj estas tiu ĉi-apuda. 20 kandidatoj el 11 diversaj landoj.

Ĉiu nomo estas antaŭigita de litero donita laŭ la dato de la ricevo de la kandidatiĝa dosiero. Tiu litero estos retrovebla apud la nomo sur la balotilo. Ĝi estas destinata simpligi la voĉnombradon.

**2007**

| | |
|---|---|
| A | HAMER Chris (AU) |
| B | KPODO Karl GH) |
| C | HIRSCHMANN Gerhard (DE) |
| D | FEDERMANN Georges (FR) |
| E | LUGUERN Joël (FR) |
| F | WHEELER Rob (US) |
| G | DUBOIN Marie-Louise (FR) |
| H | METZ-KRENCKER Liliane (FR) |
| I | PRIMAVERA Heloïsa (AR) |
| J | GUPTA Dauji (IN) |
| K | TENBERGEN Rasmus (DE) |
| L | NAFATI Mustapha (MA) |
| M | KOSTYO Kenneth (NL) |
| N | DIOMAYE Sene (SN) |
| O | CHUZEVILLE Bernard (FR) |
| P | REBELLO Leo (IN) |
| Q | RIEDEL Ulisses (BR) |
| R | PEINGNEZ Vincent (FR) |
| S | ANGELLOZ Yves (FR) |
| T | FISCHER Wolfgang (DE) |

## La balotelektaj dokumentoj

? Majo estos dediĉata por la fabrikado de la dokumentoj, nome :

? Kunmetita dokumento el 12 paĝoj enhavantaj klarigon pri la graveco de la voĉdonado kaj la metodo, kaj por ĉiu kandidato duonpaĝon de memprezento kaj propraj celoj, kun foto.

? Balotilo je A5 formato sama por ĉiuj lingvoj, preskaŭ kiel la ĉi-apuda modelo.

? Sennoma balotil-koverto (malgranda formato)

? Senafranka respondokoverto je ordinara poŝta formato por la resendo de la balotil-koverto. (Senpaga por la sendanto). La numero de voĉdonanto aŭ de la mondcivitana legitimkarto estos enskribita sur tiu koverto.

Informaj kompletigoj estas disponeblaj en Interreto je la adreso : http://www.recim.org/A2007/

## Kalendaro

Enkalkule de la necesa tempo por la tradukadoj, la presado kaj la enkovertigo, ni esperas realigi la dissendadon dum junio.

## Traktado de la balotiloj :

La respondo-kovertoj restos fermitaj kaj stokitaj de la Balotelekta Kontrolkomisiono ĝis la 21a septembro 2007, dato de la balotelekta fermiĝo.

La **22an de septembro** okazos la voĉnombrado en Parizo. Por tiu operacio, necesos la ĉeesto de ĉirkaŭ 40 homoj por konsistigi 12 aŭ 13 voĉnombrajn tablojn (3 homoj por ĉiu tablo)

? Kontrolo de la balotelektaj numeroj

? Malfermado de la respondo-kovertoj kaj miksado de la balotil-kovertoj

? Malfermado de la balotil-kovertoj, vortigado de la voĉoj kaj sumigo.

## Kosto de la balotelektoj

Ĝis nun, la ĝusta nombro da voĉdonantoj ne ankoraŭ estas konata. Enkalkule de la presaj kaj poŝtaj kostojn, ĉiu voĉo kostos ĉirkaŭ 1,80, t.e. verŝajne sumo supera al 10.000 Eŭroj. Ĉiu monkontribuado estos bonvena. (vd. ĉi-sube).

## El la kalendaro :

s **Majo 2007 :** Eldonado de la balotelektaj dokumentoj kaj dissendado

s **28a ĝis 31a de aŭgusto :** Somera universitato de tutmondismo en Eben Emael (Lieĝo, Belgio)

s **22an se de septembro :** voĉnombrado en Parizo

s **3an kaj 4an de novembro 2007 :** Sesio de Kongreso de la Popoloj (fruaj kaj novaj delegitoj) en Lieĝo

s **20an de marto 2008 !** Tago de Monda Unueco

RECIM-Mondo estas eldonaĵo de Registrolibro de la Mondcivitanoj. La servo estas dirata senpaga. Tamen Registrolibro akceptas ĉiujn memvolajn kontribuojn : per monbiletoj, mandatoj aŭ per poŝta ĝiro al :
CCP PARIS 2848 94 Y je la ordo de Registre des Citoyens du Monde.
*IBAN* **: FR 10 2004 1000 0102 8489 4Y02 027 - Bank Identifier Code : PSSTFRPPPAR**
UEA-kodo : **mciv-a** (Internacia Registrolibro de Mondcivitanoj)
Pagoj eblaj per banka karto kaj PayPal : www.recim.org/cdm/form-eo.htm

Imprimé par les moyens de l'association à « Les